

STEFANO 170

El la enhavo:

Letero de Václav Havel
Kongresaj preparoj
Revizio de PIV?
Homonomoj 10
El Esperanto en la ĉeĥan
Ekspozicio pri E-o
Nia spegulo



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Malfermo de ekspozicio pri Esperanto en Opava



☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
aperas 6-foje jare. Abono 15 gid.

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio,
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%
rabato.

Membrokotizoj: A 160 Kč, B 80 Kč, (C
nuligita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G
100 Kč (Starto), eksterlandanoj 20 ECU,
enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 335 Kč komencantoj,
240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Mgr. Vlasta Janá-
ková, Smetanova 26, 541 01 Trutnov.

Upozornění:

příspěvky členů přijímá naše redakce v
esperantu i češtině (texty si sami přelo-
žíme, případně chyby odstraníme). Podle
potřeby se příspěvky zkracují.

Kiom da membroj ni havas?

Membrobazo de ĈEA ĝis 1.6.1996

F - dumvivaj	437
A - labor-aktivaj	232
B - emeritoj, studentoj, senlaboruloj	419
D - familianoj	61
E - favorantoj de E-o	100
N - nevidantoj	2
sume	1.251

el tio rektaj membroj 330

(t.e. 26,4% de membrobazo)

G - abono de Starto sen membreco 4

Rimarkigo: ĉe kategorioj A, B, D, E, N,
G estas kalkulataj sole membroj, kiuj
pagis membrokotizojn por 1996 ĝis la
indikita dato.

Květa Hubnová

**Václav Havel en Esperanto!
Kiu havas foton el K. Vary?**

En la pasinta numero de Starto ni infor-
mis ankaŭ pri la intenco eldoni la tea-
traĵon „Aŭdienco“ en traduko de Josef
Vondroušek, sed ne ankoraŭ povis anon-
ci aperon, ĉar tiutempe mankis al ni
kopirajto de la aŭtoro, ĉeĥa prezidento
Václav Havel.

Intertempe la eldonejo KAVA-PECH
la kopirajton jam ricevis, kaj preparoj
estas en tia stato, ke ĝis UK la verko
estos eldonita. Tamen por proponi la
kovrilpaĝon ni atendas ĝis la lasta
momento, ĉar ni esperas, ke ekzistas iu
de vi, karaj legantoj, kiu fotografis
aktorojn de la prezentado de Aŭdienco
dum la komuna kongreso de ĈEA kaj
GEA en Karlovy Vary. Se jes, se la foto
estas teknike kvalita kaj vi afable donos
kopirajton por ĝia aperigo (kompreneble
kun indiko de la aŭtoro de la fotogra-
faĵo), ni volonte utiligos ĝin por la frun-
ta kovrilpaĝo de la verko.

Bonvolu kontakti tiukaze eldonejon
KAVA-PECH, Petr Chrdle, Anglická
878, 252 29 Dobřichovice, tel. (02) 991
2201, fakso: (02) 991 2126, elektronika
adreso (E-mail): chrdle@kava-pech.cz.
Antaŭdankon.

KONGRESAJ PREPAROJ

Trejnado

Sabate la 7-an de junio 1996 renkontiĝis en Palaco de Kulturo en Prago naŭdeko da personoj por „trejni“ la organizadon de UK. Apud LKK-anoj, reprezentantoj de Ĉedok (Ing. Kalina kun ĉiĉeronino) kaj UEA-representanto Nikola Rašič venis volontulaj helpantoj, kiuj volas zorgi pri la eksterlandaj gastoj. Ili mem pagis la kongresan kotizon kaj tamen la plejparton de sia kongresa tempo dediĉos al aliaj. La tuta partoprenantaro trairis tiujn salonojn kaj salonetojn, kie okazos la kongresaj programeroj, poste preparolis siajn problemojn en apartaj grupoj (bonveniga grupo, loĝiga grupo, ĉiĉeronoj, dokumenta servo ktp.).

En la antaŭtago, vendrede, ĉeestis kunsidon de LKK ankaŭ Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA.

Ekumena diservo

okazos dimanĉe 21.7.1996 je la 16.30 en evangelia preĝejo „Salvátor“, Salvátorská strato, Praha - Staré Město (metroo A - Kafkova strato).

Predikos vicprezidanto de Akademio, nederlanda pastro Gerrit Berveling.

Letero de la prezidento

Prezidento de Ĉeĥa Respubliko Václav Havel sendis telegramon al la kongreso de Blinduloj, kiu okazos unu semajnon antaŭ UK:

*„Estimataj geamikoj,
dum mia tuta vivo, kaj precipe nun en funkcio, kiun mi plenumas, mi vidas ĉiam pli grandan kaj eĉ neanstataŭigeblan signifon de lingvo en kontaktoj inter la homoj.*

Neripetebla unikeco de parolata vorto, de ideo, komunikita en diversaj lingvoj, montras mirigan lingvan varieblecon kaj ekskluzivecon, precipe por tiuj niaj samcivitanoj, kiuj havas okulan handikapon. Ĉiu ajn lingvo inkluzive de Esperanto estu por vi sekura lumo en via vivo.

Kore mi salutas vin okaze de la 62a tutmonda kongreso de blindaj esperantistoj en Ĉeĥa Respubliko kaj deziras al vi belajn travivaĵojn dum restado ĉe ni.

Václav Havel

Originalo:

Vážený přítelé,

po celý svůj život, a zvláště nyní ve funkci, kterou vykonávám, spatřuji stále větší až nezastupitelný význam jazyka ve styku mezi lidmi.

Neopakovatelná jedinečnost mluveného slova, myšlenky, sdělené v různých jazycích, ukazují na úžasnou jazykovou variabilitu a výjimečnost, především pro ty naše spoluobčany, kteří jsou zrakově postiženi. Nechť jakýkoliv jazyk včetně esperanta je pro Vás bezpečným světlem ve Vašem životě.

Srdčně Vás zdravím na 62. světovém kongresu nevidomých esperantistů v České republice a přeji Vám hezké zážitky z pobytu u nás.

Václav Havel

Oficiala antaŭkongreso en Brno

Moravia folkloro al la mondo estas temo de la ĉijara oficiala antaŭkongreso, kiun organizos Ĉeĥa Esperanto-Asocio kunlabore kun kongresa entrepreno KAVA-PECH Dobřichovice. Ĝis nun aliĝis 37 partoprenantoj de 9 landoj, inter ili 4 ekstereŭropaj (Brazilo, Israelo, Japanio kaj Koreio).

Kvankam la programo estas preparita por eksterlandanoj kun la celo konatigi ilin kun ĉarma sudmoravia folkloro, ĉeĥaj esperantistoj povas partopreni jenajn unuopajn partojn de la programo:

dimanĉe 14-an de julio:

20.00 - INTERKONA VESPERO en spegula salono (*Zrcadlový sál*) de hotelo Slovan (Lidická strato) *senpage*

lunde 15-an de julio:

9.00 - GVIDATA PROMENO tra historia centro de Brno; *senpage*

11.00 - SOLENA AKCEPTO de la urbestro de Brno s-ino Lastovecká en urbodomo de Brno *senpage, nepre antaŭanoncu vian venon*

20.00 - KŘENOVÁK prezento de folkloro ensemblo en spegula salono de Slovan *libervola*
(*marde 16-an de julio:* tuttaga ekskurso, jam plene okupita)

merkrede 17-an de julio:

9.00 Promeno al la burgo Špilberk

20.00 - KONOPA - folkloro ensemblo de Ratíškovice, spegula salono de Slovan *libervola*

ĵaŭde 18-an de julio:

9.00 forveturo de la hotelo Slovan - tuttagaj ekskursoj laŭ elekto:

- PÁLAVA-montaro: piedekskurso proks. 10km kun komuna vespermanĝo en Mikulov (sen manĝado 30 Kč, kun komuna vespermanĝo 200 Kč, por tagmanĝo bv. mem porti manĝaĵon)

- BRATISLAVA: trarigardo de ĉefurbo de Slovakio kun komuna vespermanĝo survoje reen en Mikulov (sen manĝado 50 Kč, inkl. tag- kaj vespermanĝo 420 Kč)

Nombro de partoprenantoj en ambaŭ ekskursoj limigita per liberaj lokoj en aŭtobusoj

vendrede 19-an de julio

19.00 adiaŭa vespero ĉe kordcimbala muziko kaj abunda vespermanĝo en la vinejo Špilberk *500 Kč*

sabato 20-an de julio

9.00 - komuna aŭtobusa vojaĝo al UK kun trarigardo de Telč. Antaŭvidita veno al la kongresejo inter 16-a kaj 17-a horo (inkl. enirbileton, sen tagmanĝo 150 Kč, inkl. komunan tagmanĝon 350 Kč).

Pliajn informojn vi ricevos kaj aliĝojn (ankaŭ al senpagaj programeroj) sendu al: Stanislava Chrdlová, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

Tel.: (02)991 2201, Faksu kaj registriilo: (02) 991 2126, E-mail: chrdle@kava-pech.cz

-stch-

FAKA LINGVO

LEKSIKOGRAFIO

Rilatoj inter *Plena Ilustrita Vortaro*
kaj Akademio de Esperanto

Bernard Golden

Urĝa tasko: leksika revizio de *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV)

En n-ro 163 (1/1995) de *Starto* aliris mian atenton du artikoloj, ĉar ili rilatas al revizio de PIV. Sur pĝ. 10 „PIV - nova eldono“ informas, ke Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) preparas novan eldonon de tiu vortaro, kiu estis eldonita en 1970 kun *Suplemento* en 1987. La artikolo rimarkigas, ke PIV „enhavas preserarojn, nesufiĉajn difinojn kaj aliajn mankojn, kiujn korekti kaj elsarki povas nur la tuta esperantistaro.“ La dua verko, „Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature“ (pĝ. 12-14) el la plumo de d-ro Josef Kavka, reliefigas misojn kaj mankojn en PIV rilate la morfologion de sciencaj vortoj, kiuj atencas la etimologion kaj sekve, ne akordas kun internacie uzataj formoj en fakaj medioj. Trafe komentas la aŭtoro: „Estas evidente, ke por venonta PIV-eldono necesos leksika revizio. Jen urĝa tasko por Akademio de Esperanto.“ Pri la neceso fari revizion de PIV d-ro Kavka pravas kiel pulvo, sed lia sugesto, ke Akademio de Esperanto okupiĝu pri tiu laboro, estas naŭva mispenso. Antaŭ jardeko mi mem provis doni tiun taskon al la Akademio, sed mia propono estis ĵetita en rubujon fare de la mallarĝmensa Akademia prezidanto d-ro Albault. Jen la faktoj. Laborplano de la Sekcio pri Generala Vortaro

Jam de longe mi okupiĝis pri kritika ekzameno de PIV kaj publikigis plurajn studaĵojn pri specifaj temoj. Kiam mi fariĝis la direktoro de la Sekcio pri Generala Vortaro de la Akademio, mi proponis kiel novan kaj utilan funkcion de la Akademio la entreprenon de profunda revizio de PIV, por ke tiu konsultlibro estontece fariĝu certgrade „oficiala“ vortaro de Esperanto, eĉ se ne ĉiuj vortoj kaj propraj nomoj en ĝi estos oficialigitaj.

Kvankam en la pasinteco AdE ne okupiĝis pri kompilado kaj publikigo de vortaro de Esperanto, ĝi devas nun preni la respondecon de ĉiuspeca leksikografia agado en Esperantujo por eviti pli da kaoso en la formado kaj evoluigo de la leksiko de Esperanto. Same kiel akademia gramatiko, ankaŭ akademia vortaro estas nepre bezonata por certigi stabilecon en la lingvo, kiu ankoraŭfoje troviĝas en kriza situacio pro la hodiaŭa tendenco enkonduki amason da neologismoj havantaj nekonvenajn formojn kaj duban utilon. Mi, do, proponis, ke mia sekcio dediĉu sin al la sekvaj agadoj.

- a. senerarigo de ĉiuj aspektoj de la lingvouzo de PIV kaj eventuale ankaŭ en etnolingvaj Esperanto-vortaroj, kiuj baziĝas sur registraĵoj en PIV
 - b. raciigo de la formo kaj arango de la leksika materialo en PIV
 - c. ĝisdatigo kaj pliampleksigo de la vortprovizo kaj difinoj
- Tiujn procedojn plenumis nur en minimuma maniero la *Suplemento* de PIV.

Kun specifa rilato al la speco de ĝustigado, kiun antaŭvidas d-ro Kavka, mi inkludis jenan rekomendon en la laborplano de la sekcio.

Starigo de principoj por asimilado

de etnolingvaj etimoj

Ĝis nun Esperanto ricevis sian leksikan materialon laŭ pluraj vojoj kaj en kaprica maniero. Zamenhof mem ne starigis eksplicitajn gvidliniojn por asimilado de etimoj el diversaj lingvoj. Rezulte de tio, oni neniam povas esti certa pri la formo, kiun etnolingva vorto havos en Esperanto. Ekuzantoj kutime decidas pri la Esperanta formo laŭ sia bontrovo, senkonsidere ĉu ili estas literaturistoj aŭ sciencaj fakuloj.

Nekompetenteco de la Akademio

La raporto, kiun mi preparis pri la estonteca laboro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro, ne havis eĥon. Prezidanto Albault rifuzis mian planon, argumentante, ke AdE ne povas okupiĝi pri PIV, ĉar ĝi estas la propraĵo de SAT. Sed, paradokse, nuntempe estas ĝuste SAT, kiu invitas la tutan esperantistaron informi la respondeculon pri reviziado, Michel Duc Goninaz, pri ĝustigendaĵoj en la vortaro.

La kompilado de la leksiko de Esperanto kaj la redaktado de vortaro en la estonteco devas esti la primara funkcio de AdE, por ke malaperu diletantismo de sur la leksikografia tereno. Mi kiel unuopulo kaj ankaŭ kiel la direktoro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro de AdE provis en limigita maniero montri la vojon al pli preciza leksikografia traktado de Esperanto. Tamen, estas necese marteladi la punkton, ke la tasko estas por la tuta Akademio. La grava demando estas, ĉu la nuna AdE estas kapabla kaj kompetenta plenumi tiun grandan projekton.

Post publikigo de la laborplano, mi atendis komentojn de aliaj anoj de AdE, sed neniuj reagis per serioza pritrakto de la temo. Eĉ la kolegoj en la Sekcio mem montrigis apatiajn. Sekve de tio, mi estas

pesimisma pri la preteco de AdE en ties nuntempa stato solvi leksikografiajn problemojn. Bedaŭrinde, d-ro Kavka vane atendas okupiĝon pri la „urĝa tasko“, kiun li proponas al la Akademio.

Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature

10

Josef Kavka

-AN-, -ON-

Jena deka (STARTO, 1994, 4, 20-21; 5/6, 23-26; 1995, 1, 12-14; 2/3, 17-19; 4, 8-11; 5, 5-7; 6, 10-14; 1996, 1, 13-19; 2, 10-12) parto de nia konsiderado pri homonimoj estu la lasta. La radik-finaj -AN- kaj -ON- evidentiĝas malplej „dangeraĵ“, kiom temas pri homonimeco kun iliaj paralelaĵoj sufixsaj.

Laŭkutime, ni komencu per la leksiko **fundamenta**. Temas pri solaj 9 vortoj, okaze de kiuj povus - pure teorie - aperi homonima koincido:

ĉikano (ĉiko estas neoficiala nomo de tropika insekto-specio);

fazano (fazo estas oficiala termino)

fontano ne ĝenis nian Majstron pro ebla kolizio kun font-ano;

kalkano kun kalk-ano;

Korano kun kor-ano, jen interesa hazardo;

mangano koincidas kun la neoficiala mango;

membrano: membr-ano (tiu ĉi liveras pleonasmon, ĉar ano kaj membro povas sinonimi...);

turbano (turbo estas vorto oficiala)

Resume: Kiam aperis koincido de -AN-

radikfina kun sufiksa, *Zamenhof nepre* ne timis ĝin.

Same ne timis la oficialigantoj, kiuj respondecas pri jenaj 17 vortoj:

banano;

bramano (bramo ja estas la fiŝo fundament-leksika);

dekano esprimas laŭ PIV kvar nociojn (el ili unu ĥemian), se oni neglektas la homoniman dek-anon;

dogano (dogo estas same oficiala);

humana (ankaŭ humo estas oficiala-
lajo);

Irano: oni ne timas ir-anon, sed timas paciĝi kun iro (Iro) anstataŭ irlandano;

organo (orga troviĝas en EB, do ne povis ĝeni dum la oficialigo de la perfekte internacia termino);

paviano koincidas kun loĝanto de l' itala urbo kaj loĝanto en pavi-arbaro (*Aesculus pavia* el *Hippocastanaceae* estas nomita laŭ *Peter Paw* el Lejdeno; ĉi-okaze ni esperu, ke esperantistoj ne emos rebapti la belan arbon per „paviano“; kp. la 7-an parton de niaj konsideroj);

piano;

platano (*Platanus*, laŭ la helena *platys* = plata, larĝa) bonŝance ne fariĝis „platanuso“ (kp. la 5-an parton de niaj konsideroj), pro ebla timo antaŭ platano;

romano - jen plejado da homonimoj;
satano;

Sudano, kvankam suda lando, ne estas sud-ano;

tirano; **ulano**;

veterano havas nenion komunan kun vetero, tamen pienrajte kaj prave ekzistas en la leksiko de Esperanto:

Da neoficialaj -AN-vortoj radikfinaj, kiuj homonimas kun siaj sufiks-paraleloj, ni kalkulis 60. Tamen ni kontentiĝu komenti nur iujn:

albano;

alkano: alko estas fundamenta nomo por *Alces* el cervedoj, sed la nomo apartenus pli eble al *Alca*, en PIV neoficiale misformita per „alkao“ kaj „aŭko“. Ni opinias, ke la naĝbirdo devus esti nomata *alco* kaj la familio *alcedoj* (*Alcidae*). Nu, la saturita hidrokarbono alkanon estas sendanĝere homonima kun alk-ano;

altano; **Amano**;

argano, la borsonda turo, homonimas kun loĝanto de la peloponeza ĉefurbo;
arĝentano nur similas arĝenton, sed homonimas kun arĝent-ano;

arkano; **atmano**; **avano**; **bukano**;

butano, la hidrokarbono C_4H_{10} , hazarde koincidas kun la terkultura termino (ne ter-mino, pardonu pro la ŝerco):
buti;

ciano;

ciklano, la saturita cikla hidrokarbono, estas homonima kun cikl-ano;
elano; **emano**;

etano, la saturita necikla hidrokarbono C_2H_6 , homonimas kun et-ano;

furano, la heterocikla substanco, hazarde koincidas kun fur-ano;

furo (*Mustela eversmanni furo*) estas rusa putoro;

galbano;

hidroplano ne homonimas kun hidropl-ano, sed kun hidro-plano; hidro (*Hidra*), la celenterulo, estas mem homonima kun du pluaĵ nocioj en PIV;

ruano; **kardano**;

konstantano, jen alojo kun konstanta elektra rezistanco, ne „konstanta ano“;

kvartano;

lantano (*Lantano*) estas tropika kurac-planto el verbenacoj, samtempe rara ĥemi-elemento kun atom-numero 57, fine homonima kun lant-ano;

lukano (*Lucanus*), la granda koleoptero, estas homonima kun la romana

poeto kaj kun luk-ano;

majorano (*Majorana*) el lamiacoj (PIV: labiacoj), ofte uzata kuireje, homonimas kun oficira „major-ano“;

mediano;

mentano, la organika substanco, estas nomita laŭ la aroma mento (*Mentha*) el lamiacoj;

metano, la plej simpla hidrokarbono CH_4 , estas homonima kun met-ano;

mirobalano (*Prunus myrobalana*), pli moderne *P. cerasifera*, *subsp. myrobalana*), estas arbo uzata de fruktoĝardenistoj kiel t.n. sub-trunko; homonimo: miro-bal-ano;

monoplano: *Raymont Schwartz* jen havus okazon interpreti: plano por akiri monon, konstruonte tiaspecan aviadilon;

nonano, la saturita hidrokarbono C_9H_{20} , konsistaĵo de benzino; la latina *nonus* -naŭa, Nonoj (*Nonae*) la naŭa tago kaj la kanonika horo;

oktano, la saturita hidrokarbono C_8H_{18} , same konsistigas benzinon; la latina *octo* = ok; en EB (1988), okto = oktavo, la muzika intervalo de ok gradoj;

Omano; **pavano**; **pagano**;

pentano, la saturita hidrokarbono C_5H_{12} ; la helena *penta* (= kvin) havas nenion komunan kun la fundamenta verbo *penti* (la: *paenitere*); pentozano, polisaharido de pentozo, tamen homonima kun pentoz-ano;

pirano, la heterocikla kombinaĵo ne estas derivita de piro (*Pyrus*), sed de la helena *pyr* = fajro;

pulmano; **radiano**;

rodano, la sulfociano, estas homonima kun homo, kies okupo situas en rodo, la eksterhavena parto de maro;

rumano, la zamenhofa neoficialaĵo, neniel estas koneksa kun la fundamenta nomo de l' alkoholaĵo;

savano; **Sekvano**;

silano, la kombinaĵo de silicio kaj hidrogeno, koincidas kun prizorganto de silo;

solano (*Solanum*) el solanacoj, estas homonima kun ermito, piulo vivanta en solaeco;

ŝamano; **teraplano** (tera plano); **terciano**;

titano, la hemi-elemento (atomnumero 22) homonimas kun la filo de Urano kaj eble kun adepto de la prezidendo Tito;

tomano;

tramontano, la frida vento, bele homonimas kun ekz. kontrabandisto migranta tra montoj;

tukano (*sp: tucán*), la brazila birdo, nomita fare de tieaj indianoj, ne havas tukon, sed grandegan bekon;

uretano, estero de karbaminata acido, povas „ŝvarce“ interpretiĝi kiel ur-et-ano;

valeriano (*Valeriana*) el valerianacoj, estas nomita laŭ la romana *Valerius*;

varano (*Varanus*) el varanedoj (*Varanidae*), estas granda lacertulo;

volano; **gamelano** (PIVS); **trimarano** (PIVS).

Fine restas pritrakti -ON-vortojn. Por koncizigi, ni menciuj sole tiujn **fundamentaĵojn**, el kiuj produktiĝas homonimoj konsistantaj el fundamenta radiko plus la sufikso -ON-: bastono, burĝono, citrono, ĉifono, galono, kapono, kartono, kolono, kotonono, masono, melono, mentono, miliono, ordono, salono, timono, vagono. Alispeca estas kalso (kalso). Sume do 18 ekzemploj, dokumentantaj, ke mankis timo antaŭ homonimo. Jes ja, ĉar la sufikso -ON- estas tro speciala, almetata nur al numeraloj. Tio eliminis ĉian eblan konfuzon kun

eventuala homonimo. Kvazaŭsufiksa - ON- en ketonoj, atomparkoj, organ-unuoj estas en Esperanto nepre integra radik-parto.

Do, sole por esti kompletaj, ni elnombru, sen komenti, koncernajn 23 oficialaĵojn: balono, barono, baritono, blazono, ciklono, dragono, festono, frontono, kanono, kantono, karbono, kokono, kupono, nilono, opono, ozono, patrono, pensio, pontono, stadiono, trombono kaj alispecaj: gramo-fono, mono-fono.

Da neoficialaj vortoj, de ni ĉi-konekse interesataj, estas 101. Koscience ni elkribris ilin, sed por ŝpari lokon, ties kompleta prezento estu rezignata. Tamen, por demonstri, pri kiaspecaĵoj temas, ni listigu almenaŭ 10 ekzemplojn: betono, elektrono, fotono, gazono, kriptono, limono, radono, piramidono, silikono, taksono.

Epiloge

La lastaj du partoj (-AR-, -ER-; -AN-, -ON-) de nia konsiderado permesas fari principan konkludon, iom skizitan jam enkonduke al la parto unua (-OL- kaj -UL-): La sennombraj homonim-okazoj en Esperanto estas neeviteblaĵo de la planlingvo; ties afiksa sistemo kaj facila kunmeteblo de radikoj konsiderinde plialtigas - kompare kun ajna etnolingvo - nombron da homonimoj. Miŝformi fontlingvan radikon, por ke evitiĝu homonimeco, jen kondamninda procedo, precipe se temas pri nomenklaturaĵoj internacie kodigitaj. Esperanto, kiel planlingvo, celu laŭeble ordon, almenaŭ en tioma grado, kioma estas atingita en ĝiaj fontlingvoj.

Lastfine ni ŝuldas apartan dankon al la kompilinto de Inversa Vortaro, *Bernard Pabst* (1989). Sen tiu ĉi verko

apenaŭ estus realigebla la serĉado de paradigmatraj vort-okazoj, bazitaj sur fontlingva (plejparte latina) radikfino. Ja ni limigis nin al koicidaro kun iuj Esperanto-sufiksoj.

Fontoj

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970) - Sennacieca Asocio Tutmonda, *Paris*.

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento (1987) - Sennacieca Asocio Tutmonda, *Paris*.

Esperanta Bildvortaro (1988). *R. Eichholz* - Esperanto-Press, *Bailieboro*. Inversa vortaro de Esperanto (1989). *B. Pabst* - Esperanto-Centro, *Paderborno*.

Kiel „hradiště“ en Esperanto?

Dum la 2-a seminario por la helpantaro de UK en Prago mi estis demandita, kiel esprimi „hradiště“. Mia propono por „opidumo“ vekis iom da embaraso, ĉar la demandanto konis tiun terminon nur kun ligo al keltoj.

Mia respondo: estas historia eraro rilatigi opidumon sole al keltoj. Opidumo estis en la antikva Romio „fortikigita loĝo“ (ne necese fortikaĵo). La moderna arĥeologio uzas tiun antikvan terminon por samspecaj objektoj de aliaj kulturoj, ekz. kelta.

PIV-Suplemento proponas du terminojn: 1) opidumo (alta, fortikigita loko, defendita per remparo kaj foso, kaj servanta en la antikveco kiel rifuĝejo), 2) kastrumo (lat. castrum): militista stacio de la Romanoj fortikigita per remparo, palisaro kaj fosaĵo. - Rim.: ĉi tie la radikoj estas kastrum-, ne kastr-!).

Ambaŭ terminoj, prefere la unua,

taŭgas por nia „hradiště“. - Cetere, jam en 1978 uzis ilin B. Golden (Heroldo de E., 7, 1978), por „rifugejo de regantaj familioj kaj de la ceteraj loĝantoj“. E. Urbanová en sia „Hetajro dancas“ uzis por tio la kunmetitan vorton „kastelvilago“.

J. Mařík
9.6.1996

AKVAJ HETEROPTEROJ

Evžen Wohlgemuth

La heteropteroj (ĉeĥe „ploštice“) estas ordo de insektoj. Ili havas plimulte milde platan korpon, kies formo estas ordinare ovoforma, ĉe iuj familioj kaj specioj longforma, iam ankaŭ bastonforma. La karakteriza eco de heteropteroj estas ilia buŝa organo, kiu servas al pikado kaj elsuĉado de plantoj kaj animaloj. La unua paro de flugiloj estas malgranda, ĉi tiuj flugiloj estas nomataj elitroj. La dua paro, kiu normale estas faldita sub la unua, estas maldika kaj membranforma kaj servas al flugado. La heteropteroj reproduktas sin per ovoj. El ili eloviĝas etaj larvoj, kies formo, vivo kaj nutraĵo estas la sama kiel ĉe maturaj heteropteroj. Ili iomoble elhauĝigas, post la lasta elhauĝiĝo jen estas la matura insekto kun flugiloj, kiu povas reprodukti.

Akvaj heteropteroj estas dividataj en du grupojn. La unua grupo vivas sur akva nivelo, la dua sub akva nivelo.

La heteropteroj de la unua grupo estas sume nomataj akvokurj heteropteroj aŭ akvokuraj cimoj (ĉeĥe „vodoměrky“ kaj „bruslařky“). Ili uzas akvosurfacan streĉon al kurado sur akva nivelo. Iliaj kruroj estas longaj. Ili vivas sur la nivelo de stagnantaj kaj malrapide fluantaj akvoj, ili voras plejparte insektojn falintajn

sur akvan nivelon. Ĉi tiuj heteropteroj vivas ĉe ni en kvin familioj.

La heteropteroj de la dua grupo estas veraj akvaj heteropteroj. Ili vivas ĉe ni en ses familioj. Ankaŭ ĉi tiuj heteropteroj spiras kun traheoj kiel aliaj insektoj. Tial ili devas ĉiam post iom da tempo ascendi al akva nivelo kaj tie alĉerpi la aeron. Ovoj estas metataj en tigojn de akvaj plantoj.

La plej abundaj akvaj heteropteroj estas akvocikadoj (ĉeĥe „klešťanky“). Ili havas sian nomon tial, ke ili povas eldoni ĉirpan sonon. La akvocikadoj estas malgrandaj, plej ofte 8-10 mm longaj, iuj specioj estas tute malgrandaj, aliaj male iom pli grandaj. Iliaj elitroj estas malhelaj, preskaŭ nigraj. La malantaŭa paro de iliaj kruroj estas longa kaj remilforma, ĝi servas al naĝado. Du antaŭaj paroj estas malgrandaj, la media paro servas en trankvilo al apogtenigo sur plantoj kaj aliaj objektoj. La akvocikadoj vivas en stagnantaj kaj malrapide fluantaj akvoj, ofte en granda kvanto. Ili elsuĉas algojn. Alĉerpitan aeron ili metas inter haretojn sur ventra parto de sia korpo. Iliaj larvoj estas helaj, ĉar ili ne havas ankoraŭ flugilojn.


Tre simila estas notonekto (ĉeĥe „znakoplavka obecna“). Ĝi estas pli granda, 15 mm longa, griza aŭ grizverda. La malantaŭa paro de ĝiaj kruroj estas longa kaj remilforma. Ĝi vivas en stagnantaj kaj malrapide fluantaj akvoj. Ĉe spirado ĝi pendiĝas al akva nivelo, la aeron alĉerpas sub elitrojn. La notonekto estas raba, ĝi kaptas kaj elsuĉas akvajn animalojn, precipe krustulojn, insektojn kaj ankaŭ fiŝidojn.

Ofta akva heteroptero estas akvoskorpio (ĉeĥe „spleštné blátivá“). Ĝia korpo estas proksimume 2 cm longa, plata malhelbruna, sur fino de sia abdomeno

ĝi havas longan spirtubeton. La antaŭa paro de kruroj estas raba, adaptata al kaptado de rabajo. Ĝi vivas en stagnantaj kaj malrapide fluantaj akvoj, kie ĝi rampas sur fundo kaj sur plantoj. Ĉiam post iom da tempo ascendas sur plantoj al akva nivelo kaj alĉerpas ĉi tie la aeron en traheojn. La akvoskorpio kaptas diversajn akvajn animalojn. Ĝiaj larvoj ne havas spirtubetojn.

Tre interesa estas bastona akvocimo (ĉeĥe „jehlanka válcovitá“). Ĝia korpo estas bastonforma, proksimume 4 cm longa, grizbruna, kun tre longa spirtubeto sur la fino de abdomeno. Same kiel la akvoskorpio ĝi havas la unuan paron de kruroj adaptitan al kaptado de rabajo. Ĝi vivas en stagnantaj kaj malrapide fluantaj akvoj, kiel ĝi plimulte senmove sidas sur plantoj kaj esperas rabajon, kio estas diversaj akvaj animaloj. Ĉe tio ĝi similas al branĉeto. Ĝiaj larvoj ne havas spirtubeton.

Ĉe ni vivas ankaŭ iuj malmulte abundaj kaj konataj akvaj heteropteroj. La prezentataj specioj estas la plej abundaj kaj bone konataj. Ili estas tre interesaj akvaj animaloj, tial ili estas laŭokaze bredataj en akvarioj. La akvocikadoj estas nutraĵo de fiŝoj.



LITERATURO

Lee Chong-Yong en la ĉeĥa

kiel jam anoncote en pasinta numero de Starto, dum junio aperos en la eldonejo KAVA-PECH kvar publikaĵoj, kiuj estas tradukitaj el Esperanto, tiuj de Kurisu Kei, Lee Chong-Yong, Yosimi Umeda kaj Bruno Vogelmann. Dum sekvantaj numeroj ni volas prezenti ilin al legantoj de Starto.

Hodiaŭ ni pli proksime rigardu unu el ili, verkon de la prezidanto de UEA kaj profesoro de ekonomiko en la universitato en Taegu (Koreio), kiu nomigas *Vzorec ekonomického úspěchu. Dvacelitělá zkušnost z Asie*. (La Formulo por Ekonomia Evoluo. 20-jara Sperto en Azio). Ĉi tiu konciza verko (16 paĝoj) estas origine prelego de la aŭtoro ene de la Internacia Kongresa Universitato dum UK pasintjare en Tampereo.

En la verko la aŭtoro asertas, ke konata ekonomia „miraklo“ en Azio ne estas vera miraklo, male, ekzistas simpla formulo, laŭ kiu oni povas atingi ekonomian sukceson en ajna lando. Miraklo nur estas, ke la registaroj ekster Aio ankoraŭ ne komprenas la formulon. Kaj la mirakla formulo, kiun la aŭtoro klarigas en la verko? Jen ĝi:

diligenta laboro
+ malalta imposto
+ alta ŝparo
+ minimuma regado
= ekonomia sukceso

Sur la foto videblas la aŭtoro Lee

Chong-Yong komune kun eldonisto kaj tradukanto de la verko Petro Chrdele dum Korea Esperanto-kongreso novembro 1995. Ili ĵus priparolis la ĉehan eldonon de la priskribita verko.

-pch-



MAJO

(Longega mia voj, vana vokado!)

Hodiaŭ estas la unua de majo, simbolo de amo, merite de Karel Hynek Mácha [ma:ħa], la plej elstara reprezentanto de la ĉeha romantismo en la antaŭ-revolucia situacio de la unua duono de la 19-a jarcento.¹ MAJO estas fundamenta valorajo de la ĉeha poezio.

Ekŝati legi beletron (ĝis 1973: 407 verkoj, el ili 80 en esp-o²) inspiris min, en mia 5-a bazlerneja klaso, ekscitaj rakontoj pri „sovaĝaj“ indianoj, kaj mian plaĉon en (certaspeca) poezio vekis la alloga etoso de la melodieca kaj misterplena poemo de Karel Hynek Mácha (1810-1836).

Mencio de Vlastimil Kočvara en Starto, ke ĈEA ne plu atendas la forŝovatan eldonon de MAJO fare de ILTIS (pli frue de La Stafeto) en traduko de Tomáš Pumpr, laŭ la t.n. 4-a versio, kaj mem ĝin eldonos, vekis malnovajn rememorojn kaj animtuŝajn

impresojn.

Ĝis nun okazis trispekaj publikigoj de Majo en esperanto; 1) poparte en „Esperantista“, Praha, 4/1947 kaj 5/1948 kaj en „Literatura Mondo“ (Budapest), 1948, p. 44, 2) publika deklamo (de la 2-a kanto) en vespera „Mácha-Festo“ en Doksy (1946), 3) deklamo en la ĉiutagaj Esperanto-elsendoj de Radio Praha kadre de „radiofilmo“ (pásmo) pri Mácha.

Estas pensige, en la konata strofo, kie granda parto de vortoj finiĝas en la ĉeha per „-ou“ (... zemi milovanou, jedinou ... ktp.), kiuj elvokas la celitan etoson, kaj kie Pumpr provis imiti la onomatopean efikon per la akuzativaj „-n“ (landon amatan, unusolan ...), kolego de R. Hromada en la E-elsendo forigis la akuzativajn „-n“; anstataŭe restis do ĉie „-o“. Mi scivolas pri la aspekto de la strofo en la avizita eldono. Mi scias, ke ion en la tekstoj ŝanĝetis Jiří Kořínek, tamen laŭ esprimita tendenco de Pumpr plu poluri la tekston.

La tutan verkon, tamen en la ĉeha lingvo, mi estas aŭdinta en eminenta interpreto de profesia deklamistino (Pelikánová), tiel emociita, ke larmoj gutis survizaĝe ... Tre forta ĝuo! (Ho, tion travivi ankaŭ dum la UK!)

Ankoraŭ nun mi migas pro disciplinemo kaj eĉ intereso de la neesperantista publiko dum deklamo de la 2-a kanto en la Mácha-Festo en Doksy (19 majo 1946), kies programo estis eĉ tro longa. Mia vico por prezento de la teksto en Esperanto, kun 190 versoj, venis je tagordo ses minutojn post la noktomezo, en eĉ tro varma aero (!). La ĉiam ankoraŭ plena halo aŭskultis atente, ne ĝenis pro laco aŭ enuo, kaj fine rekompencis la deklamon per aplaŭdo (!). (Ja, la Doksy-anoj kutimis

vidi en sia urbo ĉiujare la Esperanto-Kolegianojn.)

La brita E.-verkisto svisdevena Reto Rossetti nomis la enkarceran scenon „potenca, angore bela kaj ekacita“. En la dua kanto li admiras „korpeman, tristan belecon“. Merite de Pumpr Rossetti fariĝis granda admiranto de Mácha. La anglan tradukon de McGovern li trovas nekompareble malpli sukcesinta ol tiun de Pumpr. (Tamen kortuŝas, ke McGovern faris la angligon sub drastaj kondiĉoj, en militkaptitejo. Eĉ tie do Mácha inspiris ...)

En la jaro 1973 skribis al mi Václav Šmejkal el la Bibliofila societo en Praha, ke estus meritplene eldoni la tutan poemegon de Mácha en la internacia lingvo kaj proponis al mi perit tion. Mi do korespondis kun V. Kočvara (ĈEA-komisiito por eldonado) kaj J. Kořínek, aŭtoro de artikolo (Starto, 1981, 1, p. 14). Dume ARTIA eldonis en 1965 en bela aranĝo francan kaj anglan tradukojn. - En Zprávy Spolku českých bibliofilů (3-4, 1974, p. 6-8) V. Šmejkal skribas pri la MAJO, peripetioj, rekono de Rossetti, neceso eldoni tradukon en esperanto. ---

Per la eldono de MAJO la ĉeĥaj esperantistoj pagos sian ŝuldon al K. H. Mácha. Kongresanoj de UK 1996 povos viziti la tombon de Mácha -sur la proksima tombejo en Vyšehrad, kie cetero ripozas ankaŭ Němcová, Smetana, Dvořák, Aleš, K. Čapek, esperantisto Macan kaj aliaj korifeoj.

Jaroslav Mařík
la Unuan de Majo 1996.

1) J. Kořínek en „Panoramo, Aŭtuno, 1975, p. 41 - ĈEA

2) laŭ mia persona Notaro

P.S. la 2-an de majo: hieraŭ vespere mi pilgrimis al la bela monumento de la juneca Hynek, en Petřín-parko. Ankaŭ Václav Havel kaj Olga ŝatis veni tien kun bukedeto. Hieraŭ, sinjoro Havel venis tien kun floretoj sen la karmemora Olga, nur kun sia hundino Ĝula [Djula]. Rendevoon unuamajan ĉe Mácha iniciatis siatempe el Kalifornio la estinta E-a Junularestro en Prago, Jan Neumann (doktoriĝinta en Usono). Sed la distanco San Diego-Prago malebligis al li „surprizi“ tie min, s-inon Křenková kaj aliajn venintojn.

Fragmento el la tria kanto de Majo:

Ankoraŭ la krimulo vide pasas
ĉion ĉi, kion kune li forlasas,
kaj lian koron la doloro fendas.
Jam harmon larmo, ĝemon sekvas ĝem' -
Ankoraŭ lasta, lasta rigardem' - -
Nun larman vidon li ĉielen sendas:
Palaj vaporoj mortas en la blu' ...
zefir' facila ilin lude tiklas,
kaj alte, alte, sur ĉielo migras
blankaj nubetoj, ĉiam plu kaj plu ...
La trista arestit' al ili diras:
„Vi, kiuj fluge al senlimo iras,
la Teron per misteraj brakoj premas,
vi steloj likviĝintaj, vi ombroj de l'
lazuř,
funebraj gastoj, kiuj ploras nur
kaj tiel mute vin ellarmi emas ...,
vin mi elektis kiel kurieron.
Kie vi pasos dum la aervado,
aŭ fine trovos limon de l' migrado,
ĉiĝ salutu sur la voj' la Teron.
Ah, Teron belan, Teron plej amatan,
lulilon, tombon kaj patrinon karan,
patrujon solan, heredaĵon fatan,
la Teron vastan, Teron senkomparan ...
Kaj se vi vidos, kie roko kaŝas
sur bord' knabinon en plorad' amara ...“

La voĉ' rompiĝis, larmo larmon ĉasas.
 Jam sur la larĝa voj' pinarbareta
 kun la krimulo marŝas la kohort'
 al la monter' malsupre ĉe la bord'.
 Ekmutis la amaso malkvieta.
 L' ekzekutisto pretan glavon tenas - -
 La vidon laste levis la arestita vir',
 ĝin ronden gvidis - poste kun ĝemspir'
 ĝin klinis teren. Tuja mort' jam venas.
 Ekblankis lia kol', ekblankis brusto nuda
 - li genufleksis - - Ho moment' plej
 kruda!
 L' ekzekutisto movas sin retreta -
 Rapida paŝ' kaj fulma glav-eksvingo:
 Flugas la glav', la nukon hakas klingo.
 La kap' forfalis - Salt' - kaj salt' ripeta.
 Jam eĉ la trunk' sin al la tero rulas.

Novaj libroj en Esperantujo

La UEA-organo *Esperanto* anoncis en siaj 6 unuaj ĉijaraj numeroj 18 novajn titolojn de lemolibro, vortaroj kaj beletraĵoj. Menciindas *Princidino Mary* de M. Lermontov, *Dekamerono* (La unuaj tri tagoj) de G. Boccaccio, *Ruĝdoma sonĝo* de Cao Xueqin (ĉina ĉefverko el 18a jc.), *Mirrakontoj de Liaozhai* de Pu Songling (17a jc.), *La orpantolono* de M. Lundren, *Nobela novelaro* de tri svedaj Nobel-premiitoj (P. Lagerkvist, H. Martinson, E. Johnson.), *Serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo* de Umberto Eco, *Vino, viroj kaj kanto* de Eli Urbanová, *Tena* de Spomenka Štimec, *La ĉapo de la sterko-vermo* de G. Kamaĉo, *Infanoj en la Transmondo* de F.C. Xavier, *Invento de l' jarcento* de J. Modest, *La Aĵoj kaj la Sezonoj* de Ulrich Becker.

Komputilaj tajpistoj serĉataj

Esperanta Literatura Fondaĵo Brno serĉas samideanojn, kiuj posedas komputilon PC kaj kiuj volonte helpus enkomputiligi literaturajn tekstojn (mane aŭ skane) kaj prepari ilin tiel por preso. Ĝis nun tiun laboron faras nur du personoj, s-ano Mendl el Milevsko kaj mi. Ni du preparis librojn antaŭ nelonge eldonitajn kiel *Milito kontraŭ Salamandroj* de Karel Čapek, *Propra biografio de Karolo IV*, *Ne nur soldato Švejk* de Jaroslav Hašek, por preso estas preparitaj *Knaboj de la Kastora Rivero* de Jaroslav Foglar, *Majo* de Karel Hynek Mácha kaj *Aŭdienco* de Václav Havel. Enkomputiligitaj estas ankaŭ *Naŭ fabeloj* de Karel Čapek, *La plej eminenta el Pierotoj* de František Kožík, *Martira morto de sankta Venceslao kaj de lia avino sankta Ludmila* de Kristiano, *Spektaklo por dioj* de Karel Maršík, *Malliberulo de la prezidento* de Vladimír Škutina kaj *Problemoj en Panonio* de Achille Gregor, *Rumcajs* de Václav Čtvttek.

Tamen ankoraŭ multegaj verkoj restis en manuskriptoj. Ili povas facile perdiĝi, kio jam multfoje okazis. Male, la enkomputiligo ne nur dekobligas ŝancon „ĝisvivi“ la eldonon, sed ebligas tuj prepari la tekston, kiam aperas mono. Plie, kelkaj grandaj verkoj ne estas eldoneblaj surpapere pro financaj obstakloj (ekzemple vere giganta vortaro), sed en komputila formo ili estus facile realigeblaj kaj distribueblaj.

Plej saĝe estus konservi ĉiujn tekstojn, kiuj tion meritas, per diskoj CD-ROM, kio nun ne estas nereala, nek multekosta.

Multegajn manuskriptojn postlasis

s-ro Josef Vondroušek kaj ankaŭ de aliaj s-anoj ni ricevas tekstojn, kiujn ni deziras rapide enkomputiligi.

Kompreneble, ni ne povas honorarii la laboron alie ol per ekzempleroj de eldonitaj verkoj.

Sed sen tia laboro ne havus nia ideo perspektivojn por estonto.

Miroslav Malovec
Bosonožská 15/10
625 00 Brno

LOGOZOFIO

Ĉu vi scias, kio estas logozofio? Certe ne. Kvankam ĉi tiu scienca fako estiĝis jam en la jaro 1930 en Sudameriko, ĝi nian landon ĝis nun ne atingis. Ĉi tiun vorton vi trovos en neniuj vortaro aŭ enciklopedio. En Sudameriko, precipe en Brazilo, ekzistas pluraj logozofiaj fondaĵoj, kiuj subtenas disvolviĝon de la logozofio kaj eldonas logozofiajn publikajojn kaj librojn. Kreinto de la logozofio estis argentina profesoro Carlos Bernardo González Pecotche (1901-1963), kiun liaj konatoj kaj disĉiploj nomis Raumsol. Se vi volas ricevi informojn pri la logozofio, skribu per Esperanto peton al logozofia fondaĵo en Belo Horizonte, kies adreso estas jena: Fundação Logosófica, Rua Piauí, 742, Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo.

Mi sciiĝis pri la logozofio interesmaniere: Niaurba esperantistino montris al mi esperantlingvan informilon pri la logozofio, presitan en Brazilo, kiun ŝi ricevis el Ĉinio. Do la informilo ĉirkaŭvojaĝis pli ol duonon de la terglobo. Al la informilo estis almetita formularo de enketo pri logozofio. La samideanino diris al mi, ke mi ĝin plenu kaj sendu al enketanto, logozofia fondaĵo en Belo

Horizonte, kiu promesis, ke ĉiu partoprenanto de la enketo ricevos libron de Raumsol „La Mekanismo de la Konscia Vivo“ en la dezirata el jenaj tri lingvoj: hispana, portugala kaj angla. Mi ricevis ĝin laŭ mia deziro en la angla kaj donacis ĝin al mia amiko, kiu regas la anglan lingvon. Ĉar mi rimarkigis, ke mi regas neniun el menciitaj tri lingvoj, la fondaĵo almetis al menciita libro ankaŭ libreton „Bazoj por via KondutoP en Esperanto. Versajne ĝi estas unusola el verkoj de Raumsol, kiu ĝis nun estis tradukita ankaŭ en Esperanton.

Raumsol bazis sian opinion sur la konvinko, ke unusola vojo al plibonigo de socia vivo estas individua plibonigo de vivo de ĉiu unuopulo. Ne estas certa, ĉu Raumsol konis verkojn de Komenio, sed estas versajna, ke prezidento Václav Havel ne konas verkaron de Raumsol, tamen la sama ideo eksonis en lia prologo, per kiu li malfermis internacian konferencon okaze de la 400-a datreveno de Komenia naskiĝo, kiu okazis en la jaro 1992 en Prago: „Se la aferoj principe ŝanĝiĝu plibondirekten, devas la homo komenci de alie. Oni devas komenci tiel dirite elinternen. De si mem. En la verkaro de Komenio estas neceso de ĉi tiu nova homa sinkompreno antaŭvideme enhavita.“

-st-

NIA SPEGULO

Informoj el la komitato

La aprila komitatkunsido okazis en Opava kaj havis - krom vere laboriga programo - ankaŭ societan parton. La prezidanto de la asocio invitis la komitaton al tagmanĝo, kiun partoprenis ankaŭ la urbestro kaj vicurberstrino de Opava, kun kiuj la komitatoj tenis viglan diskuton pri nia agado. La kaŭzo de ties ĉetabliĝo estis vivjubileo de la subskribinto. La tagordo de la komitato komenciĝis per kontrolo de protokolo el la pasinta kunveno kaj sekvis diskuto pri mastrumado de la asocio. Oni decidis fondi daŭran kapitalan fonduson, en kiun enirus kotizoj de dumvivaj membroj kaj ankaŭ profitoj el iuj asociaj aranĝoj. Tiu ĉi decido celas kolektadon de necesaj financaj rimedoj, kiuj longdaŭre alportus - eĉ se ne tro grandajn tamen regulajn - enspezojn (= interezojn) por kovri abonojn de Starto de dumvivaj membroj. Bazon de la fonduso estas akcioj ekposeditaj de la asocio.

La plej grandan parton de la kunsido prenis informoj pri la 81-a Universala Kongreso kaj ĝiaj akompanaj programoj - antaŭkongreso kaj postkongresaj ekskursoj, infana kongreseto ktp. La asocio por ili preparas kelkajn eldonaĵojn kaj plaĉajn suveniurojn. Traktinte la nacian kongreson en Havřov oni decidis fari „inventuron“ de sekcioj kaj kluboj de CEA. Samkiel la pasintjara esploro pri la membraro purigis kaj ordigis nian membrokartotekon ankaŭ tiu ĉi decidos

resumos staton de nia potenco kaj kapablo en la landa movado. Nuntempe certe jam ĉiu loka Esperanto-grupo ricevis koncernan enketilon. Mi kredas, ke ĉiu loka kaj sekcia funkciulo traktos la komitatan intencon serioze kaj en la 8-a kongreso ni povos klare proklami veran situacion en nia asocio. Lige kun tio oni nun strebas revivigi unue la pedagogian sektion, kiu en la lastaj jaroj iom dormas. La komitato ankaŭ akceptis aligproponon por fonduso K. Piĉ kaj konstatis, ke en UEA ni havas 104 individuajn membrojn. Fine estis diskutitaj diversaj interesajoj de enlanda movado kaj kontaktoj de CEA kun diversaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj.

La venonta kunsido okazos junie en Trutnov.

vlko

Ni kondolencas

La 3-an de aprilo 1996 mortis en aĝo de 84 jaroj s-ano **Vlastimil Blažek**, honora prezidanto de Esperanto-klubo en Olomouc. Estante filo de kunfondinto de ĉi tiu klubo, li konatiĝis kun Esperanto jam en junaĝo. Baldaŭ li fariĝis funkciulo de la klubo kaj en jaroj post la dua mondmilito li estis aktiva ankaŭ kiel regiona peranto de tiama Esperanto-Asocio en ĈSR. Li redaktis bultenon Informilo kaj por diversaj ĉeĥaj gazetoj li skribis grandan nombron da artikoloj pri Esperanto. Li partoprenis plurajn universalajn kongresojn kaj en la lastaj jaroj li okupiĝis pri dokumentoj pri la Esperanto-movado en nia lando, kiujn li transdonads al Distrikta arkivo en Olomouc. Grandan parton de sia vivo dediĉis la mortinto al oferema kaj persistema agado por Esperanto kaj tial la rememoro je li restas kiel modelo por multaj

aliaj anoj de la Internacia lingvo.

VI. Mohapl

La 15-an de aprilo 1996 forpasis **Ladislav Piotrowski**, komitatano de E-klubo Ostrava-Vítkovice.

La 16-an de aprilo 1996 forpasis la ĉefepiskopa konsilanto kaj emerita paroĥestro pastro **Alois Eineigel** naskiĝinta la 31-an de januaro 1914 en Frydek. Ordinita la 4-an de julio 1937 en Vidnava. Pastre li servis en Český Těšín, Frydek, Jeseník, Šenov kaj Havířov.

Kio estas FS CEA?

Fervojista sekcio de ĈEA estas unu el 24 landaj asocioj de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). IFEF estis fondita en la jaro 1909, al UEA ĝi aliĝis en 1953. Ĝia nuna prezidanto estas Per Engen el Norvegio. Anoj de IFEF - pli ol 1.800. Celo de IFEF estas disvastigi kaj apliki Esperanton en la fervojaj administracioj kaj en la fervojaj medioj kaj rondoj. Ĉiujare estas organizata Fervojista kongreso en majo kaj Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno ordinare dum februaro. La ĉijara 48-a I.F.E.F. Esperanto-kongreso okazos en Den Haag, nederlando, en 11-18 de majo kaj la 37-a Internacia Fervojista Skisemajno okazis en la tagoj 18/24-02-1996 en Kouty nad Desnou en Montaro Jeseníky.

Organo de IFEF estas Internacia Fervojisto, parte ilustrita, eldonata nuntempe en Danio, 6 numeroj ĉiujare. Malaltigita kotizo por nia lando estas nur 72,- Kč.

Aperis aŭ en preparo estas diversaj vortaroj nacilingvaj-esperantaj. Estis eldonita Fervoja Difinvortaro por klarigi 10200 fakterminojn. Plie la faka

komisiono de IFEF lingve kaj stile revizias la fakprelegojn por la kongresoj, prizorgas eldonadon de kajeroj kun fervojaj novaĵoj. Aperas la informiloj Fervojfakaj Kajeroj kaj Terminara Kuriero (6 n-roj jare).

Evidente la fervojistoj en la nuna ŝtata tereno de Ĉeĥa respubliko dekomence vigle agadis en la faka E-movado. „Fervojista Esperantisto“ jam en 1911 anoncas 29 membrojn de IFEF en Bohemio kaj Moravio. Sed laŭ aliaj fontoj jam pli frue unuopuloj aktivis, precipe en Olomouc.

Post la unua mondmilito reviglis ankaŭ fervojista movado. Depost la UK en Praha 1921 tri ĉeĥaj kolegoj eniris la internacian estraron ĝis 1924. Tiam ankaŭ fondiĝis en la „urbo de fervojistoj“, Česká Třebová, la tutŝtata fervojista E-movado. Ĉiloke necesas menciigi la nomon de Josef Řebíček, kiu jam tiam laboris ne sur oficiala scenejo, sed des pli laboregis sur faka kaj nefaka terenoj, ĉefe kiel tradukisto, i.a. de internaciaj fervojaj reglamentoj.

Post 1924 Josef Blažek kaj aliaj i.a. kunlaboris en la fondo de „Verdfa Stacio“ ĉe Radio Brno kaj klopodis ĉe pluraj fervojoj establi esperantlingvajn informilojn en trafikiloj. En 1932 ekzemple en la tiama Ĉeĥoslovakio ekzistis ĉirkaŭ 80 stacidomaj tabuloj kun informoj en kaj pri Esperanto. De 1929 ĝis 1938 regule aperis „Esperanta anguleto“, redaktita de O. Charvát, en la oficiala porfervojista revuo, eldonata de la direkto Bratislava.

En la jaroj 1935-1938 kaj 1947-1950 kvar direktoj de ČSD oficiale rekomendis partopreni E-kursojn.

Post la konata „malhela periodo“ de nia E-movado iom post iom reviglis ankaŭ fervojista E-movado. En 1965

jam ekzistis viglaj E-rondetoj precipe en Česká Třebová, Praha, Děčín kaj Havlíčkův Brod. Sekve en printempo 1965 kaj dank' al subteno de la trafikministerio fondiĝis fervojista fakgrupo kun 260 membroj sub gvidado de Bohumil Král. En la 17-a IFEF-kongreso en Hamar la 26-an de majo 1965 IFEF akceptis la novan ĉeĥoslovakon landan asocion kun unue 60 membroj. La membronombro en Ĉeĥoslovakio mem fine de 1965 atingis 483. La 17-an de aprilo 1966 okazis la unua jarkunveno eb Česká Třebová.

En la jaro 1969 estis fondita ĈEA, al kiu multaj fervojistoj aliĝis kiel Fervojista Sekcio de ĈEA. Dum internaj komplikajoj en la jaroj 1980/81 provizore formiĝis dua fervojista organizo en nia lando, kiu poste en 1982 estis likvidita. De post tiam ekzistas nur FS de ĈEA, kiu agas kiel Landa Asocio de IFEF. Nuntempe ĝi havas pli ol 60 membrojn.

Terminara Komisiono de FS ĈEA preparis por eldono Ĉeĥan-Esperantan Fakvortaron, sed mankas mono por ĝia eldono. Krome oni preparas por eldono Fervojfakan Kajeron n-ro 5.

Membro de FS ĈEA povas fariĝi ĉiu membro de ĈEA, do ne nur fervojisto, sed ankaŭ familiano aŭ amiko de la fervojo. Por samtempa membriĝo al IFEF kaj uzi malpli altajn kotizojn por IFEF-kongresoj kaj aliaj aranĝoj, sufiĉas aliĝi kaj aboni organon de IFEF, Internacia Fervojisto por jara abono 72,- Kč ĉe Jiří Pištora, Nové náměstí 1746, 560 02 Česká Třebová. Aliĝilojn petu de la prezidanto de FS Jindřich Tomišek, 751 18 Říkovice 33 aŭ de la sekretario inĝ. Jiří Vencel, Nové náměstí 1745, 560 02 Česká Třebová.

Jindřich Tomišek

Printempa seminario en pensiono ESPERO

Longe atendata printempo ne kaj ne venis, do esperantistoj handikapuloj kiel proteston kontraŭ longa kaj laciga vintro organizis almenaŭ printempan renkontiĝon en Ĉeĥa paradizo. En tagoj 14.-21.4.1996 en pensiono ESPERO en vilaĝeto Skokovy kunvenis 44 esperantistoj el diversaj lokoj de nia lando kaj 2 germaninoj. Solena inaŭguro estis dediĉita al Dr. L.L. Zamenhof (datreveno de lia morto) kaj al organizaj aferoj. Ĉiuj interesiĝis pri la ebleco trovi sponsorojn por propagandi Esperanton. S-ano Filipová transdonis al posedanto de la pensiono MUDr. Hradil flageton de E-klubo en Přerov, kaj klarigis, kiamaniere la klubo trovis sponsoron por propagandi la klubon kaj la urbon.

De lundo ĝis vendredo antaŭtagmeze estis por interesatoj aranĝitaj E-kursoj, kaj la ceteraj, kiuj akompanis la handikapulojn, promenadis en la ĉirkaŭaĵo sub gvidado de Drah. Kočvara. Trifoje dum la semajno - marde, jaŭde kaj sabate - estis aranĝitaj aŭtobusaj ekskursoj al la vidindaĵoj de la Ĉeĥa paradizo. La unua celis al la kastelo Sychrov, ni trairis rokaron Malá Skála al Frýdštejn kaj poste ni ĉirkaŭveturis rokaron kaj ruinon Trosky. La dua ekskurso estis al urbeto Sobotka kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, ankaŭ ni vizitis la tombon de Fr. Šrámek, kaj la lasta ekskurso estis al Valdštejn, kie ni admiris bildon pri K.H.Mácha. La vetero estis favora, brilis la suno kaj ĉiuj estis kontentaj.

Vesperaj programoj estis variaj: prelegoj kun diapozitivaj de Drah. Kočvara kaj prelegoj pri la Ĉeĥa paradizo kaj pri verkisto K. Klostermann de s-ano Mráz,

prelego de Dr. Hradil pri la konservado de la sano, kaj konkursoj kaj amuzaj vesperoj fare de geedzoj Filip kaj J. Rýznarová.

Liba Filipová

Martelet-citro*

Irante tra la Karlo-ponto en Prago oni povas aŭdi agrablan, sed nekutiman muzikilon, t.n. martelet-citron. La klavojn lerte manipulas viro iom aĝa, kun grizeta barbo kaj okulvitroj. Apud li staras tabulo kun nomoj de ĉ. 50 lingvoj. Inter ili esperanto. Al ĉiu interesito li afable donacas presitan folion kun priskribo de la antikva kord-instrumento en lia lingvo, kun ŝato ankaŭ al esperantistoj. Li jam scias pri nia UK. - La esperantigon faris por li - kaj bone! - germana turista. - Irante tie haltu ĉe li!

(jm)

* ĉeĥe: kladivková citera

Kiel fartas Klubo de esperantistoj de doktoro Schulhof en Pardubice?



Rigardu la foton!

Ĝi montras agrablan atmosferon en urba biblioteko en Pŕelouč, kien invitis partoprenantojn de ĉiumonataj lingvaj seminarioj membrino de EK Pardubice. La seminarioj estas tre ŝatataj kaj pli kaj pli akiras popularecon. Ili estas aranĝataj kune kun Asocio de esoerantistaj handikapuloj.

E-klubo jam komencis propagandi kongreson de UEA sur tabulo de montrofenestro en filatelie vendejo Pofis en pasaĝo de pardubice ĉefstrato. En vestiblo de urba biblioteko de Pardubice ni malfermis E-ekspozicion, kiu daŭros la tutan junion. Tie ankaŭ okazos la lasta seminario de tiu ĉi lernjaro, la 15-an de junio.

Okaze de la kongreso ni eldonos novan esp. broŝuron pri Pardubice, kunlabore kun AEH.

Membroj de EK preparas sian IX-an Esperanto-tagon, kiu okazos en Kultura domo DUBINA de la 10-a horo sabaton 21-an de septembro 1996. Dum la renkonto partoprenantoj rememoros nunjaran mondkongreson en Prago per diapozitivaj, videoj kaj per propraj travivaĵoj. Petu invitilon, kie estos skribitaj busoj, per kiuj Vi facile atingos kulturalan domon, ankaŭ skribu, se Vi interesiĝos pri tagmanĝo. Skribu al Jarmila Rýznarová, Na Okrouhlku 953/21, Pardubice.

Novajoj de Asocio de esp. handikapuloj (AEH)

Certe jam ĉiu ĉeĥa esperantisto scias, ke tiu ĉi asocio regule monate eldonadas gazeton Informilo kaj kvaronjare almanakon Antaŭen, do aperas 16 numerojn dum la jaro por nuraj 70 Kč.

Abonantoj estas tiel ĉiam sufiĉe frue informitaj pri diversaj programoj kaj novaĵoj ne nur el mondo de handikapuloj.

Meze de aprilo 1996 estis aranĝita printempa internacia renkonto en pensiono Espero en Skokovy. Matene multaj partoprenis gimnastikon, poste 2.5 horojn diligente lingve perfektigis en 4 grupetoj, la akompanantoj de familianoj dum tiu tempo ĉiutage turistis. Post la posttagmeza ripozo li povis partopreni jogon, eluzi masaĝojn kaj elektroterapijon kaj bonegan zorgemon de doktoro Hradil preskaŭ ĝis la nokto. Ĉiuvespere estis interesa programo. Dum la semajno ĉe bela suna vetero estis aranĝitaj 3 busaj ekskursoj en ĉarman ĉirkaŭaĵon.

AEH kune kun EK Pardubice preparis por kongreso de UEA taŭgajn afiŝojn, kvankam nur nigreblankajn en grandeco A3, A4 kaj kiel postkarto, do interesuloj skribu tuj al adreso de AEH.

Por venonta jaro estas jam preparata monata kalendaro, kie estos prezentitaj kelkaj viglaj E-klubo. La kalendaro estos eta suveniro por eksterlandanoj, granda kiel postkarta notlibro en proksimuma prezo 30 Kč. Interesuloj skribu dum monato oktobro al adreso: Josef Vaněček, Na Okrouhlíku 953/21, 530 03 Pardubice.

Sabate 18.5.1996 AEH aranĝis solenan renkonton en Slaný, okaze de metado de memorŝtono al tilia arbo, kiun platis E-invalidoj antaŭ 6 jaroj. 15 partoprenantoj estis akceptitaj de urbestro kaj poste ĉe tilio, kiu bele kreskas surrante de patrinlermeja ĝardeno, prezentis infanoj sian programon. Poste ĉeestantoj trarigárdis interesan ekspozicion en la lernejo.

JARY

Esperanto-tendaro NEKVASOVY

Esperanto-rondeto ĉe kulturdomo Esprit en Pilseno (Plzeň) aranĝas jam 5-an tendaron 18.8.-30.8.1996 en pitoreska vilaĝeto Nekvasovy inter Nepomuk kaj Pačejov ĉe la trajnkonekto n-o 190: Plzeň - České Budějovice.

Banado, fungoĉerado, sportado, societaj ludoj kaj nedevisa Esperanto-instruado kun regulaj rondetoj de Esperanta konversacio, lingvistikaj ludoj, gimnastikado, jogo k.s.

Prezroj de restado:

- 1 semajno 850,- Kč (930,- SK)
- 2 semajnoj 1530,- Kč (1670,- SK)

Ĉi tiuj prezroj estas nur antaŭpago, la rezulta sumo povas esti plus minus 10%. Aliĝilojn sendu al: Klub Esperanto-Plzeň, Jiří Vomáčka-předseda, Koterovská ul. č. 30, CZ-301 41 Plzeň.

Festivalo de Esperanta kulturo en Krakovo

Infanaj esperantistoj el Česká Třebová ekveturis al la festivalo jam la 8-an de majo, unue al Bielsko-Biala por kunveni tie kun lokaj klubanoj kaj vespere viziti E-familion. Komune kun polaj E-infanoj ili veturis plu al Krakovo. Dum la festivalo niaj infanoj prezentis kantojn, naciajn dancojn, scenetojn kaj fabelojn, la polaj infanoj kantis.

Bedaŭrinde la vetero estis tre malagraba, multe pluvis, kaj post la reveno hejmen la 12-an de majo kelkaj infanoj malsaniĝis.

-Zn-

**Konferenco de IKUE
en Česká Třebová
(17.5.-19.5.1996)**

Prezidanto de katolika sekcio de ĈEA kaj landa reprezentanto por IKUE Miloš Šváček prezentis raporton pri la trijara laboro, precipe pri la pasintjara IKUE-kongreso en Olomouc kaj pri la katolika tendaro en Sebranice. Realigis ankaŭ balotado.

Sabatan vesperon riĝigis per sia programeto lokaj infanaj esperantistoj. Dimanĉe la konferencanoj ĉeestis Diservon. Ing. Jan Kalný, vicprezidanto de la katolika sekcio, informis la kredantojn pri Esperanto.

-zn-

**Psike malsanaj homoj,
memrajtaj, kaj la internacia
lingvo Esperanto**

Mi jam tri jarojn instruas la lingvon Esperanto al psike malsanaj homoj, ne nur al mezaĝuloj, sed ankaŭ al gejunuloj. Mi bone konas ilian animon, sopirojn ktp. Ili deziras lerni lingvojn, havi eksterlandajn geamikojn, legi ĵurnalojn, gazetojn, revuojn. Sed bedaŭrinde la homoj pensas pri ili suspekto, kiel ĉeĥoj diras „dívat se přes prsty“ (rigardi tra inter fingroj, t.e. malŝate). Ĉu ili lernos Esperanton aŭ preferos la anglan, francan ktp., dependas de esperantistoj kaj de ilia helpo. Se vi volas lingve helpi ilin, petu adresojn de lokaj grupoj de Ĉeĥa Asocio por Psika Sano. Nia adreso estas: Česká společnost pro duševní zdraví, pobočka Ostrava, esperantská skupina, Skautská

9/1081, 708 00 Ostrava-Poruba. Ni respondos kun plezuro.

Gustav Heczko

**9-a Internacia Kultura
Festivalo en Ústí n. L.**

okazos dum la lasta septembra semajnfino (27.-29.9.1996). Ĉi tiu internacia renkontiĝo estas sufiĉe konata kaj havas jam sian bonan tradicion, nome dank' al ĉiujara kvalita programo kaj al ĉeestado de multaj eksterlandanoj. Pasintjare partoprenis ĝin entute 75 gesamideanoj el 5 landoj kaj la tuta duono el ili estis ĝuste la esperantistoj el Germanio (precipe el Saksio, Bavario, Turingio, Meklenburgo, Sakcio-Anhaltio ktp.), Luksemburgio, Pollando kaj Slovakio. Ĉijare ni atendas ankoraŭ partoprenon de esperantistoj el pluaj landoj.

Por ĉijara renkontiĝo preparas Ekklubanoj el Ústí n.L. denove interesan programon, krom la alia eĉ simpatian interkonan vesperon kun muziko kaj danco en la loko de loĝigo kaj plue dimanĉan busan ekskurson al la monaĥejo en Osek, kies kelkaj trezoraroj estas registritaj ĉe UNESCO.

Aliĝilojn kun detala programo sendos al vi je via peto Ing. J. Kříž, Družstevní 411/11, 400 07 Ústí n. L. (tel. 047/5500283 post la 18-a h. aŭ deĵ. 047/5241629).

Ekspozicio pri Esperanto en muzeo

Silezia Landa Muzeo en Opava jam longe kunlaboras kun la loka Esperanto-klubo. La kunlaboro havas diversajn formojn kaj ĝi alportis jam plurajn sukcesajn rezultojn. La plej evidentaj por publiko estas ekspozicioj. La 29-an de majo malfermiĝis jam la kvara komuna ekspozicio, aranĝita en lastaj jaroj. Ĉar ĝi estis preparita okaze de la 81-a UK en Praha, estas ĝia temo iom ĝenerala: „Mondo sen interpretistoj.“ Pere de diversaj dokumentoj kaj objektoj - cetere por esperantistoj neniel eksterordinaraj - ĝi informas pri Zamenhof kaj lia verko, pri la movado kaj pri la kultura valoro de Esperanto. Apartaj ekspoziciaj paneloj prezentas Esperanton kiel ilon de politika batalo, propagando de eklezioj, kiel komunikilon en radio, poŝto kaj turismo. La fakan uzon de la lingvo demonstras diversaj eldonaĵoj, SAEST-prelegaroj kaj aliternejaj dokumentoj, ekz. de AIS San Marino. Por vizitantoj estas certe allogaj diversaj „kuriozaj“ esperantaĵoj - propagandiloj de Esperanto-muzeoj, Esperanto-ludiloj, cigaredoj, alumetoj, trinkaĵoj, ornamaĵoj kaj similaj Esperanto-nomaj produktoj. La lasta parto de la ekspozicio informas koncize pri riĉa agado de Esperanto-klubo en Opava, kiu estas dokumentita pere de ties eldonaĵoj, fotografajoj, prospektoj kaj leteroj. La esperantistajn vizitontojn ĝojigos dokumentoj el la 13-a UK en Praha en la jaro 1921, malnovaj Esperanto-afiŝoj kaj libroj el la komenco de tiu ĉi jarcento.

La ekspozicion, kiu daŭros ĝis komenco de septembro, akompanas la

afiŝo, invitilo kaj varboprospektoj. Informoj pri ĝi aperis en kelkaj tagjurnaloj inkluiĝe de la tutŝtataj. Tio ja estas sekvida ago de lokaj esperantistoj, kiu, bedaŭrinde, ne trovas pluajn imitantojn kiel decus en lando gastiganta post longa tempo la Universalan Kongreson!

VI. Kočvara

Interesatoj estas invitataj en labortagoj 8-12, 13-16 horo, en libera tago laŭ antaŭanonco ĉe VI. Kočvara.

(Mal)junularo kunvenis

La 2-an de junio 1996 nia klubo en Ostrava okazigis la duan renkontiĝon de iamaj junularaj aktivuloj el kvindekaj jaroj. El fotoj kaj kronikoj de tiu tempo ni preparis murgazeton. Esperante ricevi salutleterojn, ni invitis eĉ niajn eksklubanojn, kiuj elmigris al eksterlando - imagu nian surprizon, kiam Julie Zakopčanová startigis aŭtomobilon kaj alveturis el Francujo. Ŝi gajnis florbukedon por plej malproksima gasto. Tostante ni konsumis pli ol 100 sandviĉojn kaj 200 unuglutajn sandviĉetojn, ne mankis donacitaj legomoj kaj konfitaĵoj. Ĉion preparis 5-membra laborgrupo sub gvido de M. Mikolajková el E.K. Ostrava-Poruba. Ni konsilas aranĝi en via klubo similajn renkontiĝojn.

Drahomír Kočvara

ILEI - Pedagogoj

Por la ĉeĥa ILEI-sekcio ĝis nun aliĝis 12 personoj (L. Filipová, G. Heczko, J. Karen, A. Klementová, J. Křížková, M. Malovec, J. Mendl, A. Mrázová, J.

Patera, J. Rýznarová, L. Špína, J. Vojáček), por ILEI-seminario en Tábor nur unu (Malovec). Dum la ILEI-tago en UK preparas M. Malovec ankaŭ informon pri la instru-sistemo en Ĉeĥio.

Koncize

- La 83-a Universala Kongreso de UEA 1998 okazos en la franca Montpellier
- post Asteriks, la gladiatoro kaj Asteriks kaj Kleopatra aperis nova kajero Asteriks kaj la Normanoj
- ĉijare ni rememoras datrevenojn de famaj tradukistoj Hilda Dresen (1896-1981), estonino, Kolomano Kaloscay (1891-1976), hungaro, kaj niaj Miloš Lukáš (1897-1976) kaj Tomáš Pumpr (1906-1972).
- 3.-17.8.1996 okazos 15-a IKUE-kongreso en Sebrance apud Litomyšl
- nova estraro de Akademio: d-ro Werner Bormann - prezidanto, s-ino Perla Martinelli, sekretariino, Gonçalo Neves kaj Gerrit Berveling - vicprezidantoj.
- FAME-fondaĵo distingis ĉijare per sia kulturpremio en valoro de 10 000 DEM la brazilan eldonisto Gersi Alfredo Bays pro liaj meritoj pri eldonado de literatura revuo Fonto, la epopeo La Luzidoj kaj helpo ĉe eldono de Plena Analiza Gramatiko
- AFRIKA VEKIGŬ estas nova 8-paĝa periodaĵo el Togolando pri Esperanto en Afriko. La unua numero enhavas multajn tajperarojn, tamen estas tre esperiga. Ĉefaj artikoloj: intervjuo kun ĉefdelegito de UEA en Togolando; Dioj ankoraŭ abundas en Afriko; La demokratio ne kulpas, sed la demokratioj; Arbarmortigo en Afriko; Tehnika helpo, ĉu vere helpo? La vojo longiĝas ankoraŭ.

- V-aj internaciaj kursoj por junularo realiĝos en Prago 20.27.7.1996, do en la sama tempo kiel UK, sed en alia loko. Prezo 1150 Kč por CEJ-anoj, 1560 Kč por neĈEJ-ano. Aliĝoj: Renata Beranová, Svatoplukova 43, 784 01 Ĉervenka

- Internacia Junulara Semajno (13.8.-19.8.1996) okazos en Eger, Hungario, 50 DEM, aliĝoj: Dávid Alko Golden, Damjanich u. 1/c.I.8, HU-8200 VESZPRÉM, Hungario

- 52a Internacia Junulara Kongreso sekvos post UK en la trankvila urbeto Güntersberge, en lafederacia lando Saksio-Anhaltio. Informoj: Vladka Chvátalová, Vysočanská 763, 582 91 Světlá n. Sázavou

- AEH-tago en Slaný okazis la 18-an de majo 1996 kun metado de memorŝtono al E-tilio plantita en 1990

- Cent jaroj de Esperanto-teatro. En septembro 1896 estis en Smolensk prezentita la unua teatraĵo en Esperanto, *Unua brandfaristo* de Leo Tolstoj, en la hejmo de s-ro Zakrjevski.

RIDU AŬ RIDETU

Edzo venas hejmen kaj kisas sian edzinon, kiu pasie reciprokas la kison.

- Kiel al vi plaĉas, ke mi razis mian barbon?

- Dio mia! Karolo, ĉu tio estas vi?!

Sinjoro alparolas knabineton:

- Kie estas via paĉjo, knabineto?

- Iru en la porkejon, sinjoro. Paĉjo tie mangiĝas porkojn. Vi rimarkos lin tre facile. Li surhavas ĉapelon.

Odesílatel:

**Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
☆ STARTO ☆**

Periodikum Českého esperantského svazu

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno

Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 15 gld

Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,

Ĉeĥio

Podávání novinových zásilek povoleno

Českou poštou, s. p., Odštěpným závodem Severní Morava,

č. j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

NOVINOVÁ ZÁSILKA

**Poštovné hrazeno v hotovosti
u pošty 746 01 Opava 1**